# La Pacdefendanto

N-o.15. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ČEHOSLOVAKIO MARTO 1953


# ESPERANTO kaj la PACMOVADO

„Sub la sankta signo de l'Espe-
ro kolektigas pacaj batalantoj"-
„NE AL GLAVO SANGON SOIFANTA !"
Jen partoj el la himno de es-
perantistoj kiun verkis nia gran
-da majstro d-ro.L.L.Zamenhof.Li
klare esprimis la sencon k celon
kiun li esperis atingi per sia
geniala verko,la internacia lin-
gvo,doninte ĝin je dispono al la
homaro.Rigardante hodiaŭ čirkaŭ
ni,necesas konstati,ke ne čiuj
esperantistoj ankoraŭ kapablis
kompreni la sencon de nia lingvo
kaj tute ne la ideon de gia kre-
into.Multaj el ni ja uzas Esper-
anton nur kiel lingvon tute sen-
cele kaj sen idee kvazaŭ ili ne
scius la kaŭzon pro kiu Zamenhof
gin verkis. Ja ili eč čiuokaze
kantas la himnon kun la supre ci
-titaj tekstoj kaj tute ne kon-
sciigas pri la profunda signifo
de tiuj kantataj vortoj.Ankoraŭ
longe ne estos realigota la celo
donita de nia majstro al la in-
ternacia lingvo,eč se la tuta ho
-maro parolus unu internacian
lingvon,se gi ne konsciigos pri
gia interna ideo kaj celo kaj
daŭrigos la batalojn inter la na
-cioj kaj diverstendencaj ekono-
miaj kaj politikaj ~~tend~~ potencoj.
Esperanto en si mem kunportas
embrion al interfratigo de la
divers -nacia kaj -tendenca hom-
aro. Sed,se la esperantistoj daŭ
-re restas blindaj kaj surdaj al
tiu fakto,estus senvalora esti
esperantisto. Kiu ne komprenas,
aŭ ne emas kompreni la internan
ideon kaj celon de nia lingvo,
tiu signifas nur senvaloran ba-
laston por la celkonscia aktiva
esperantistaro.
Oni ofte sin nomas„Samideano",
sed pli konciza estus nomi sin
reciproke nur saml ngvano,čar ne
čiuj esperantistoj estas samide-
anoj,ja eč ne konscias pri la i-
deo,kiun devus havi čiu esperant
-isto malgraŭ tio,ke ili pri gi
kantas en la Esperanto-himno.
Ni čiuj estu„Pacaj Batalantoj"
Esperanto estas bela lingvo,oni
povas gin uzi por čiuj bonaj ce-
loj,por reciproka interkompren-
igo,por interšango de diversaj
materialoj,raportoj,fotoj,spert-
oj ktp. ofte oni eč asertas, ke
Esperanto farigis Edz-peranto,
sed gia čefa kaj plej sankta ce-
lo estu kaj rest la celo, kiun
al gi donis nia majstro,esprim-
inte ĝin en ia himno!: „Ne al
glavo sangon soifanta!".
Ni,esperantistoj devas esti la
unuaj,kiuj kondamnas kaj malhel-
pas la fratmortigadon! Esperanto
al ni servu kun sia tuta potenco
por jam antaŭ la komenco malebl-
igi čiun-ajn militon kaj inter-
nacian malamikecon.La Esperanto-
movado kaj la pacdefenda movado
devas sin reciproke kompletigi,
čar ambaŭ tiuj movadoj luktas kun
samaj malhelpajoj por la sama ce-
lo.La diversnaciaj pacdefendant-
oj kongresas kaj ilia čefa baro
estas la lingva diverseco pri kiu
multaj ne emas konsciigi.La esp-
erantistoj estas jam unuigitaj
en internaciaj rilatoj kaj kong-
resoj per unu sama internacia
lingvo,sed tiuj ne konsciigis an-
koraŭ pri gia interna ideo kaj

disigas pro la diversceleco,diversideeco kaj nesamideaneco.Nia plejunua celo do estu,ambaŭflanka forigo de tiuj ĉi baroj! La esperantistoj devas intime kunfandiĝi kun la diversnaciaj pacbatalantoj kaj doni al tiuj la necesan interkomprenilon kaj la pacdefendantoj al ni fidu,ke ni sincere deziras kunlabori por la sama celo! Nur kiam tiuj du gravaj faktoroj intime sukcesos kunfandiĝi estos espero pri efektivigo de ambaŭ iliaj interesoj. La pacdefendantoj akceptu Esperanton kiel la plej urĝan batalilon por la savo de la mondpaco kaj la esperantistoj enpenetru aktive la vicojn de la naciaj pacbatalantoj kaj pere de sincera kunbatalado konvinku tiujn pri la nepra bezono de internacia interkomprenigo kaj akcepto de Esperanto por tiu celo.El tia agado ambaŭ movadoj akiros profiton kaj certigos al la homaro la sopiratan pacon.

Praktike,ĝis nun multaj pacdefendantoj aŭ ties organizoj rifuzas trakti pri Esperanto. Ili havas siajn kaŭzojn.Sed fakte an kaŭ multaj bonaj esperantistoj rifuzas aktivan partoprenon en la pacbatalo sub la preteksto konservi la neŭtralecon. Sed,ĉu ne estas tia neŭtraleco peko kontraŭ la interna ideo de Esperanto mem? Kontraŭ la celo,kiun donis al ni nia majstro? Ĉu ne malhelpas tia sinteno grave al la disvastigo de nia lingvo kaj ne nur ne allogas al ni novajn amikojn, sed ankoraŭ fortiniĝas tiujn de nia movado? -

Venis jam tempo,ke ni esperantistoj konsciiĝu pri nia celo. For kun la falsa neŭtraleco,kolektiĝu pacaj batalantoj! La demando pri la konservo de la mondpaco jam ekmoviĝis la tutan homaron.En ĉiuj partoj de la mondo oni luktas por la paco. Sed praktike la plej taŭga armilo de la pacbatalantoj kuŝas ĝis nun nur en niaj manoj kaj bedaŭrinde ofte eĉ ne sufiĉe eluzata.Ni kapablus fari per ĝi verajn miraklojn,kaj ankoraŭ pli efika tiu ĉi armilo estus, se ĝin kapablus uzi la tuta ĝis nun neesperantista pacbatalantaro.

Jam ŝtaĝiĝas-en diversaj landoj fondiĝis esperantistaj packomitatoj kaj rondetoj,kiuj kun sukcesoj laboras por nia afero. Per interkontaktiĝo,interŝanĝo de la spertoj,konsiloj,ekspozicioj ktp. Ili sukcesas akiri la atenton de la ĝis nun ankoraŭ flanke staratntoj. Ni disvastigu tiun reton, kontaktu inter ni kaj pere de la praktika uzado de nia lingvo ni finfine sukcesos kunfandiĝi kun tiu ĉi tutmonda pacmovado en la intereso de la mondpaco kaj Esperanto mem.

Rud.Burda

POSITIVA LABORO :

Iniciata komitato,fondita de la aŭstria esperantista pacrondo en Vieno disdonis al ĉiu delegito de la Kongreso de nacioj por la paco en la viena kongresejo jenan alvokon en germana lingvo:

„Miloj da reprezentantoj de ĉiuj popoloj de la tero kunvenas por priparoli kaj decidi agojn, kiuj estas taŭgaj por fortiĝi la fronton de la paco kaj certiĝi la pacon por la tuta homaro. La milito mobilizas ĉiujn disponeblajn rimedojn en tota uzo por ekstermi homajn vivojn.Ni batalas por la paco kaj tial ni devas uzi ĉiujn disponeblajn rimedojn kiuj taŭgas por garantii ĝin,por konservi la vivon al miloj da homoj.Batalilo tia,kiu ankoraŭ atendas utiligon estas ESPERANTO, la lingvo de la interkomprenigo por la popoloj. Kiel lingvo neŭtrala,starante super la rivalaj lingvoj naciaj,ĝi konformas plene al la bezonoj de la internacia uzo kaj estas facile kaj rapide lernebla.Ĝi montras sian taŭgecon en ĉiuj sektoroj de la vivo k. ĝi servas krom la lingvo gepatra kiel lingvo de ĉiu moderna homo. Dum internaciaj kongresoj kaj por la persona interrilato ĝi estas la aktuala senpera komprenilo por ĉiu batalanto de la paco,por la intelektulo same kiel por la simpla homo.ESPERANTO estis kreita de sia aŭtoro kiel instrumento por la paco.

Ne postulante aŭ ne atendante iun politikan deklaron,ni petas Vin,rekomendu al la kongreso de la popoloj por la paco,ke ĝi decidu Esperanton uzi por sia cel-

ado kaj rekomendi al ĉiuj veraj
amikoj de la paco la lernadon de
la internacia lingvo.
La INICIATA KOMITATO ESPERANTIS-
TA por la Kongreso de popoloj
por la paco.______

LA BAKTERIAJ KRIMULOJ MINACAS
EŬROPON
ᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀᵀ

El „Rudé Právo"de 13.2.1953.
La gazeto „New York Herald
Tribune"en Usono alportis eksci-
tigajn detalajojn pri amerikaj
preparoj al bakteria milito en
Okcidenta Germanio.Laŭ tiuj ĉi
informoj estos en la t.n.Strate-
gia triangulo de Pfalz pretigot-
aj krom aliaj grandaj militaj
konstruaĵoj ankaŭ multnombraj es
-plorinstitutoj,bezonaj por aran
-ĝo de bakteria milito.
La gazeto publike indikas kon
-struaĵojn,kiuj estas destinataj
kiel centraj bazoj por la bakter
-ia milito.Inter ili troviĝas
kiel objektoj n-o.320 kaj 34 uni
-versalaj malsanulejoj,n-o.2 ba-
taleja malsanulejo,n-o.804 sani-
tarejo,n-o.573 ambulanca kurac-
ista taĉmento,n-o.4 kuracista ba-
-taleja laboratorio.„New York He
-rald Tribune"skribas,ke„la"sci-
encistoj,kiuj tie laboras,helpas
ankaŭ al aliaj unuoj en Eŭropo,
ĉar ili efektivigas esplorojn,
kiujn tiuj unuoj ne kapablas en-
trepreni per sia ekipo." La ga-
zeto malkaŝe konfesas,ke multaj
entomologistoj okupas sin per in
-sektoj,kiuj estis trovitaj en
Koreio.
La metodoj de la amerikaj bak-
teriaj krimuloj neniel diferenc-
iĝas de la bruteco de la„S S gar
-distoj el la Hitler-koncentrej-
oj. Laŭ raporto de tiu amerika
gazeto estas la insektoj bredat-
aj sur homoj kaj estas farataj
bakteriologiaj eksperimentoj je
vivaj homoj. Sub gvido de ameri-
ka leŭtenanto Paul Foley devas
la „volontuloj"/plejofte elmigr-
uloj/kolekti muŝojn kaj kulojn
el marĉaĵoj tielmaniere,ke ili
demetas ĉenizojn,uzante la korp-
on kiel alogilon. La armeo speci
-ale interesas pri moskitoj. Pro
tio oni persiste serĉas regionojn
kie troviĝus kuloj nomataj„Ano-
pheles".
Tiu ĉi cinika demaskiĝo atestas
ke la amerikaj bakteriologiaj kri-
muloj -tiuj ĉi ĝismortaj malamik-
oj de la homaro - laboras ankaŭ
en Okcidenta Germanio.En la tifa
regiono de suda Germanio antaŭ ne
longe aperis amerika komisio sub
la gvido de kolonelo D.B.Holland
kiu estas la komandanto de usona
bakterimilita taĉmento en Eŭropo.
La Berlin-a gazeto„Neues Deutsch-
land"komentas tiurilate,ke la su-
spekto certe devas pliiĝi,ke la
epidemio,kiu forrabis jam multajn
oferojn,estis kaŭzita de amerikaj
bakteriologiaj krimuloj.
La malamikoj de la homaro prepa-
ras siajn krimojn sub la komando
de Wall Street en kunlaboro kun
la nov-Hitler-isma germana reĝi-
mo.Laŭ la„Generala Kontrakto"es-
tas malimplicite permesata bakte-
riologia preparo al Okcidenta Ger
-manio kaj okaze de vizito de s-o
Dulles en Bonn estis komunikite,
ke amerikaj militinstigantoj tra-
ktis kun Adenauer ankaŭ pri tiu
ĉi krimo. Okcidentgermanaj bak-
teriologoj,antaŭe laborintaj por
Hitler nun,nun estas dungitaj de
Usono.Inter ili troviĝas ankaŭ la
fame konata murdisto d-ro.Eisele
„SS-kuracisto"el la iama koncen-
trejo„Buchenwald",kiun la inter-
nacia tribunalo en Nürnberg kon-
damnis al morto kaj kiun amnesti-
is nun la Amerikanoj.
Tiel aspektas la bruteca vizaĝo
de la amerikaj imperialistoj,vi-
zaĝo de murdistoj ,kovrita per
masko kaj vestita en blanka man-
telo.Iliajn degenerajn kaj brut-
ajn planojn devas ekkoni ĉiuj ho-
moj.La homara rezisto kaj malamo
kontraŭ tiuj sovaĝbestoj en homa
formo vekas neimageblan forton,
kiu forhakos iliajn ungegojn kaj
preparos por ili la saman sorton,
kiun devis sperti Adolf Hitler.
__Trad.inĝen.Řebíček

GRAVA PROPONO
. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Faktoj montras,ke la du grandaj
internaciaj Esperanto asocioj UEA
kaj SAT estas indiferentaj se ne
kontraŭaj al la monda pacmovado.
Ne eblas atendi helpon el tiu ĉi
flanko.Aliflanke,ni esperantistoj,
kiuj volas efike labori por la pa
-co kaj Esperanto devas nepre ha-
vi okazon por plani nian agadon.
En tiu senco proponas k-do Balague
/Aŭstrio/aranĝi fine de aŭgusto
aŭ septembro INTERNACIAN RENKONT-

IĜON DE ESPERANTISTOJ PACBATALANTOJ, kie inter aliaj aferoj oni pritraktus :
a/ kiel la esperantistoj efike laboru en la pacmovado.
b/ packorespondado kaj interŝanĝo de libertempuloj.
c/ efika organizado de Esperanto-tradukservo. "
Oni proponas ST.POLTEN kiel urbon por tiu renkontiĝo, ĉar :
1./ tie oni disponus pri favora ejo.
2./ estus ebla haviĝi al ĉiu partoprenonto senkostan aŭ malmulte kostan restadon.
3./ ST.POLTEN estas en la centro de Aŭstrio 60 km.de Vieno, kio permesus al ĉiu partoprenonto post la renkontiĝo pasigi belan libertempon en Aŭstrio.
Ni petas, skribu al k-do.Ant.Balague Kirchenweg 12, ST.POLTEN, Aŭstrio, kiel vi opinias pri tiu propono, ĉar, nur se multaj opinioj estos favoraj, povus efektiviĝi tiu ĉi propono.
Kopiita el, AŬSTRIA PACRONDO ESP.

AŬSTRIA PACGAZETO PRI ESPERANTO

D-ro.Halbedl, oficiala delegito por la Kongreso de nacioj por la paco sendita el Steiermark, publikis jenan artikolon en la aŭstria pacgazeto:
„Dum la kongreso regis perfekta libereco de paroloj.Ankaŭ la vesto de la kongreso estis tre impresa kaj digna.Precipe mi estis kontenta pri la nun propra sperto, ke la teknikaj aparatoj de aŭdiloj k. kvinlingva tuja traduko estas nur malperfekta kaj malsufiĉa anstataŭaĵo de Esperanto.Eĉ la vortare bonaj tradukoj - ne ĉiuj tradukoj meritas tian rekonon - kripligis la ofte entusiasmajn paroladojn kaj forprenis de ĉiuj la efikon de la senpereco.Tial, ĉar la oratoroj estis elokventaj nur por siaj samlingvanoj aŭ la majstroj de la parolataj lingvoj, sed da tiaj partoprenis nur tre malmultaj.
Tial ni esperantistoj, dekomencaj pacigantoj inter nacioj kaj rasoj, konfesioj kaj religioj, inter politikaj partioj kaj aliaj, arangintaj jam 37 universalajn kongresojn en diversaj mondparoj kun pluraj miloj da partoprenintoj, ni, kiuj per sia neŭtrala lingvo kaj ties interna ideo disponigas al la tuta homaro eminentan rimedon por la fondo k. konservado de la paco en la tuta mondo, ni alvokas la popolojn:
Lernu kaj lernigu Esperanton, precipe al la infanaro ĉiunacia, devige kiel la unuan fremdlingvon kaj kiel la duan por ĉiu homo!"

ESPERANTO" PACDELEGITOJ

Dum la kongreso de nacioj por la paco renkontiĝis la Esp.-delegitoj en la aŭstria E-centro de Vieno.
Kvankam ne eblis al la Esperanta iniciata komitato kontakti kun ĉiuj Esp-delegitoj de la kongreso sukcesis k-do.Vokal dank'al siaj senlacaj klopodoj inviti kelkajn samideanojn al internacia esperantista renkontiĝo.
La saloneto de la Esp-centro estis plena de gesamideanoj inter kiuj s-ino U.Sarjano kaj s-ano Schmith el Londono, s-ano Abdurrahmen el Indonesio, d-ro C.Graciadeli el Italio.La paroladoj de tiuj eksterl.gesamideanoj pruvis al la ĉeestantoj, ke la kongreso ne estis, kiel diras la kontraŭuloj, unutendenca, kontraŭe, tie estis reprezentitaj ĉiuj tendencoj kaj personoj kiuj ne nur parolas, sed ankaŭ laboras por la paco.
Malnova SAT-ano, d-ro Graciadeli diris: „La itala ministro De Gasperi malpermesis la vojaĝojn el Italio por la kongrespartoprenontoj, sed multaj italaj delegitoj estis sampartianoj de De Gasperi kaj tamen venis Vienon.La paco ne bezonas pasporton.
La eksterlandaj samideanoj promesis labori en la kongreso por la internacia lingvo. Kongresano P.M.Bereterhide el Argentinio ĉeestis la Vienan Zamenhoffeston k. vizitis familion Vokal.Li diris, ke li estas 8 tagojn en Vieno kaj ege bedaŭras, ke jam de komence li ne havis eblecon kontakti kun esperantistoj.Ankaŭ kun 2 nederlandaj s-anoj ni renkontiĝis. K-do. Balague, ricevinta unutagan enirpermeson al la kongreso, klopodis vane interparoli kun s-ino Cotton, ŝi estis daŭre tre okupita.Tamen ni povas konstati, ke niaj aŭstriaj gek-doj faris bonan laboron, kiu certe trovos eĥon en estonto.

# NIA MOVADO EN ČEĤOSLOVAKIO

PRAHA, la klubvesperoj okazas re-gule ĉiuneĝrkrede en la restoracio „ŠUMAVY", Štěpánská ulice, Praha II. Kurson por komencantoj gvidas kdo. Slanina en la Junulara Klubejo. La rondeto ĉe la Kleriga Klubo Praha II. arangis paroladon de d-ro. Stan. Kamarýt pri la fondo de la Esperantista klubo en Praha okazinta antaŭ 50 jaroj, la 9.12.1952 en restoracio „U Štajgrů", Vodičkova ul.

OLOMOUC, la 20. de februaro komencigis nova kurso por komencantoj a-rangita de la Urba Kleriga Klubo. Instruas k-dino. Marie Jarmarová. Kiom da lernantoj, oni ne sciigis al nia redakcio.

LIBEREC, la E-klubo, kiu nun estas sekcio de fervojista uzina klubo, ne ĝuas favoran subtenon de la klu-ba estraro. Malgraŭ tio niaj anoj tute regule kunvenadas en nia iama propra klubejo. La programo konsistas el prelegoj, raportoj el la Esp. mondo kaj diskutoj. Estis preparitaj prelegoj de E-aŭtoritatuloj, sed pro absoluta miskomprenc al nia a-gado kaj penado ni nuligis nian intencon kaj daŭrigas la la donitaj cirkonstancoj.

KLADNO, la Esp-movado, kiu estis de 1920-1938 tre vigla en nia urbo, nun vegetas. Ĝi fariĝis sekcio de la Urba Kleriga klubo kaj nur iomete vivas kaj laboras. /Ni rekomendas al la k-doj, esti iom pli memkonsciaj kaj levi denove la kapon/

TANVALD, LA PACDEFENDANTO estas vere nia sola enlanda ligilo. Pro tio nia malgranda grupo alte taksas ĝin. Pro la diverseco de laborperiodoj ni apenaŭ sukcesas kunveniĝi ĉiujn membrojn, sed almenaŭ ĉiuj korespondas kun eksterlandanoj kaj zorgas regule pri ekspozicio en nia surstrata vitrokesto. La 26. de februaro okazis nia jarkunveno. La Urba kleriga klubo disponigis al ni kunvenejon en Mezlernejo, kie ni kunvenadas ĉiun duan semajnon.

MOST, funkcias kurso kun 10 lernantoj, kiun bone gvidas k-dino Závorková. Esp-ista oratora kurso por progresintoj estas tre sukcesa. La vizito de la kursoj estas preskaŭ ĉiam 100 %. Ĉiuj membroj vigle korespondadas. Nia propaganda ekspozicia kesto, pendigita surmure de la distrikta juĝejo akiris pro regula ŝanĝo de ekspoziciaĵoj bonan popularecon ĉe niaj urbanoj. La 15. de febr. ni arangis gajan vesperon por niaj klubanoj. Antaŭ ĝi estis ekspozicio por montri al la komencantoj la valoron kaj utili-geblecon de nia lingvo.

KLATOVY, en tiu urbo, kie ĝis nun ne ekzistis E-movado, komenciĝis dank' al k-do. Josef Z d e n ě k kurso kun 25 gelernantoj kaj fondiĝis E-rondeto. Aliĝis 2 abonantoj por „La Pacdefendanto".

OSTRAVA-ZÁBŘEH, laborkonferenco de la regionoj Ostrava kaj Olomouc komenciĝos la 14.3 per interkonatiĝa vespero kun prelego de prof. Kožený pri Esp-o kaj la nuna situacio. Dimanĉe komenciĝos la laborkonferenco je la 9.h. en záv. hotelo de Vítkovice. Partoprenos k-do. Burda kaj d-ro. Černý-Plzeň. Okazos samtempe Esp-ekspozicio.

BRATISLAVA, la 4.2.1953 komenciĝis en la entreprena klubo de la nacia asekurejo kurso kun 20 komencantoj. Instruas k-do. P. Rosa. La anoj konsistas el geoficistoj de la nacia asekurejo kaj fervojdirektejo. K-do Št. Seemann, ĉefinspektoro ĉe la fervojo uzas por la kutimaj matenaj 10minutaj diskutoj antaŭ la laborkomenco raportojn el gaz. EPĈ. Li ĉiam akcentas, ke tiuj raportoj estas perataj helpe de Esperanto. Tielmaniere li sukcesis veki intereson ĉe la aŭskultantoj, kiuj mem petis arangon de E-kurso.

EN BYSTRICE pod/Host. atingis la 10.1. sian 75 jaron plejmalnova ĝis nun vivanta Esperanto-pioniro Theodor LEJKA, autoro de lernolibro kaj vortaro aperinta jam en multaj eldonoj. Li ankaŭ fondis la unuajn ĉeĥosl. Esp-gazetojn.

---

**J. V. STALIN**

*La patro de la proletoj*

LASTAMOMENTE NIN ATINGIS TRE MALĜOJIGA RAPORTO PRI LA SUBITA MORTO DE K-DO. STALIN, LA 5. de marto 1953 je la 9.50 horo. Ni kune kun ĉiuj pacamaj homoj profunde funebras pro tiu ĉi genia kunbatalanto

# KORESPONDI DEZIRAS: "necesas!



ordinara korespondanonco unufoje publikota kostas 10.- Kčs aů du internaciajn respondkuponojn.La anoncantoj estas devigataj almenaů 1 foje respondi al čiu petanto.Jarabono por L.P.kostas 30.-Kčs por Čeĥoslovakio,por eksterlando 10 resp.kup.aů samvaloran esperantaĵon

K-do.ŠLEĈHTA Cyril,Nádražní ul.52, PRAHA-SMÍCHOV,Čeĥoslovakio, k.č.l. kaj interŝangas il.p.k.

K-do.GATTERMAYER Zdeněk,Brandlova 18,KROMĚŘÍŽ,Čeĥoslovakio,serĉas ge-korespondantojn el ĉiuj landoj por siaj kursanoj per il.p.k.,let.

K-do.SKALSKÝ Zdeněk,t.č.plícní oddělení,Státní nemocnice,O P O ČNO, Čeĥoslovakio,per let.interŝ.il.p.k.kaj p.m.Certe respondas.

K-do.Vojín,FOGL Ladislav,/soldato/ P.S.22/S10,KARLOVY VARY,Čeĥoslov., kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

K-do.PETEŘÍK Václav,Ul.Pionýrů 5. PLZEŇ,Čeĥoslovakio,pri turista kaj naturamika vivo k.č.l.,il.p.k.pm.

K-do.Gaston TRÉMON,122,Avenue Thie-rs,VILLEURBANNE-Rhone,Francio,intencas dum somero vojaĝi tra Svisio,Aŭstrio al Čeĥoslovakio per vagonaro,biciklante kaj tendumante. Li serĉas konsilon,infermon,helpon

K-do.Hiroŝi HARUTA ĉe Josihara Sindo,Hidaka-hospitalo,Gobo-tyo,. WAKAYAMA-ken,Japanio,peras interŝanĝon de infanaj pacleteroj kaj desegnaĵoj kun ĉiuj landoj.

K-do.BALAGUE Anton,Kirchenweg 12, ST.POLTEN,Aŭstrio, mia duonfilo Fred studas la 3.jaron en inĝeniera maŝinkonstrua lernejo.Dum somera libertempo necesas praktiki en fabrikejo.Lastjare li laboris kiel desegnisto en St.Pölten.Tiujare li ŝatus labori en iu eksterlanda fabrikejo1-2 monatojn kaj loĝi en E-familio.Li pagos per sia salajro aŭ mi akceptos alian junulon ĉe mi. Fred estas 18jara,laborema kaj bon-karaktera.Skribu al mia adreso.

K-do.ĈINČERA Karel,Pivovarská 177-26,DĚČÍN IV.,Čeĥoslovakio,pri ĉiuj temoj k.č.l.interŝ.il.p.k.

K-do.ROZVELIEV PANA"IOT,Kniagina Raina 15,BOURGAS,Bulgario,k.č.l. interŝ.p.m.uzitajn kaj neuzitajn, kaj il.p.k.

K-do.Vasil Ivanov ŠTERKOV,Rajkovo, SMOLJANSKO,Bulgario,pri Marks-Leninismo kaj aliaj temoj,interŝanĝas p.m.,il.p.k.kun ĉiuj landoj.

ESPERANTISTA SOCIETO,OLOMOUC,Čeĥoslovakio,gek-doj,helpu sukcesigi nian letervesperon okazonta la 1.de majo,sendu propagandan k. pac-materialon por preparata ekspozicio.Ni rekompencos.

K-do.ZDENĚK Josef,BĚŠINY č.4,okr. Klatovy,Čeĥoslovakio,serĉas korespondantojn por si kaj siaj kursanoj,interŝ.il.p.k.kaj p.m.Helpu sukcesigi lian laboron.

K-do.Hans GÄBLER,bei kaufman Kröck Karl Liebknechtstr.93,LEIPZIG S 3 Germanio,DDR,k.č.l.interŝ.p.m.

K-do.Stojan DANAILOV,str„Uspenska" N-o.16,BOURGAS,Bulgario,interŝanĝ. p.m,il.p.k.,radio-kaj sportgazetojn,fotografaĵojn ktp.k.č.l.

K-do.JOHN Josef,U nádraží č.280, OSTROMĚŘ,Čeĥoslovakio,kun abelkulturistoj per let.kaj il.p.k.kun ĉiuj landoj.Nepre respondas.

K-do.Evald MAYER,CUNERSDORF über Königstein-Elbe,Sächs.Schweiz,DDR Germanio,k.č.l.pri ĉiuj temoj.Interŝanĝas il.p.k.kaj p.m.

ESPERANTO KORESPONDA KURSO por komencantoj: se vi havas interesulojn por Esperanto kaj se vi mem ne povas instrui ilin,rekomendu al ili Skriban Kurson,kiun gvidas k-do.PYTLOUN František,STRÁŽ n/Nis. okres Liberec,Čeĥoslovakio.De li vi povas ricevi pli detalajn informojn.

PER KORESPONDADO POR LA MONDPACO!

Eldonas: OSVĚTOVÁ BESEDA - KROUŽEK ESPERANTISTů en P L Z E Ň .
Redaktas: K-do.Rudolf BURDA,Palackého nám.č.6, P L Z E Ň.
Č E Ĥ O S L O V A K I O